



Comillas - Cantabria  
29a de aprilo - 3a de majo - 2022

# 80a Hispana Kongreso de Esperanto





## Enhavo

Loka Kongresa Komitato . . . . .	2
Salutmesaĝo de la Urbestrino de Comillas . . . . .	3
Salutmesaĝo de la Prezidanto de HEF . . . . .	4
Salutmesaĝo de la Prezidanto de KantEA . . . . .	6
La kongresurbo: Comillas . . . . .	7
La kongresejo: El Espolón . . . . .	8
Ekskursoj . . . . .	9
Utilaj informoj kaj telefonnumeroj . . . . .	12
Kion ricevi per la donac-kuponaro? . . . . .	13
Prelegoj, prelegantoj kaj aliaj kongresaj eroj . . . . .	14
Programo . . . . .	16
Prelegoj, prelegantoj kaj aliaj kongresaj eroj . . . . .	18
Listo de kongresurboj . . . . .	26
Listo de aliĝintoj . . . . .	28
Norda vento . . . . .	32
Kongreslibro	80a HEK

## Loka Kongresa Komitato



Miguel



Rosa



Pedro



Carmen



Carlos



Guadalupe



Rafael

Prezidanto Miguel Gutiérrez Adúriz

Sekretario: Pedro Ullate López

Kasisto: Guadalupe Barcina Amézaga

Rilatoj kun institucioj: Carlos Cordero Huecas

Membro: Rafael Moncalián García

Membro: Rosa Santiago Mancebo

Membro: María Carmen Blanco Peña

# Salutmesaĝo de la Urbestrino de Comillas

3



Kiel urbestrino de Comillas, mi havas la honoron kaj la ĝojon varme bonveni-  
gi la partoprenantojn de la 80a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en  
nia municipo de la 29a de aprilo ĝis la 3a de majo.

El ĉi mara urbeto, kiun mi kun granda honoro estras, mi volas substreki la fak-  
ton ke ĉi renkontiĝo akiras apartan gravecon, sub la lumo de la nunaj okazintaĵoj,  
kiuj faras pli necesa ol iam antaŭe, la interhoman komunikadon super la malsimi-  
laj kulturoj.

Krome, mi deziras forte danki la Hispanan Esperanto-Federacion (HEF), kaj  
la Kantabran Esperanto-Asocion (KantEA), pro tio ke ili elektis la unikan kadron  
de Comillas, por restarigi la ĉeestajn okazigojn de siaj kongresoj, post la longa  
paŭzo trudita de la kronviroza pandemio.

Fine pensu ke vi troviĝas en unu el la sendube plej belaj kaj konataj vilaĝoj de  
Kantabrio, dotita de eksterordinara arkitektura ensemblo ĉirkaŭita de eksteror-  
dinara natura pejzaĝo.

Mi do invitas vin viziti kaj ĝui ĉiujn niajn lokajn vidindaĵojn, kies beleco im-  
pone tuŝas la koron.

Bonvenon en Comillas

María Teresa Noceda Llano  
*Urbestrino de Comillas*

## Salutmesaĝo de la Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio



Saluton al ĉiuj gesamideanoj, kiuj ĉeestas, partoprenas aŭ simple vizitas la urbeton Comillas okaze de la 80a Hispana Kongreso de Esperanto.

Jam pasis pli ol unu jaro kaj duono de kiam mi estis elektita kiel prezidanton, kaj finfine mi povas saluti vin persone, "kun permeso de la viruso", kompreneble, ĉar tiu nevidebla monstro, mortigis milionojn da homoj kaj ŝajnas ke ĝi definitive vivos kun ni.

Estu bonvenaj, geamantoj de la kulturo kaj arto, ĉar la kongreso proponas ĉion, kion ni bezonas por kapti la inspiron verki poemon aŭ pentri fantaziaĵon sur blanka tolo, do profitu la okazon kaj ne hezitu krei ion novan, ĉar la inspiro certe ŝvebos en la aero dum la daŭro de la evento kaj nur artistoj kaptas tiun belegan donacon por la vido.

Mi ne konas la urbeton, sed danke al la reto mi vidis plurajn bildojn kaj legis interesajn tekstojn pri ĝia historio, kiu estas vere interesa kaj alloga, pro tio mi ne eraras kiam mi parolas pri ĝi kvazaŭ mi estus unu el ĝiaj loĝantoj.

Krom arto ankaŭ estas amuzaj kaj distraj programeroj, kiuj ĝojigos nin dum kelkaj tagoj, kaj eĉ ne mankos prezentado de interesaj libroj, projekciado de filmoj, ekskursoj, ĉar kiel kutime esperanta kongreso temas ne nur pri prelegoj, sed pri multaj kaj diversaj aferoj.

Pasintjare ni adiaŭis la jaron kun la espero ĝui la novan en paco kaj sen pliaj minacoj, sed tio ne okazas, ja ne nur pro la pandemio, sed ankaŭ pro la stulta mili-

to, kiu mortigas senkulpajn soldatojn, infanojn, maljunulojn. Estas nekredeble ke en la 21-a jarcento kelkaj senskrupulaj regantoj provokas danĝeran militon kaj metas en riskon la tutan Eŭropon, detruas vivojn, nuligas esperojn, ruinigas la estonton. Esperantujo estas neŭtrala, sed kun energio ni petegas ĉesigon de la milito. Mi esperas ke ĉio finiĝos baldaŭ, ĉar la popolo, ĝenerale ne interesiĝas pri politiko kaj pro politikaj aferoj ekster ilia kontrolo, ili suferas la sekvaĵojn kaŝitaj subgrunde kun infanoj, maljunuloj kaj malsanuloj.

Ne estis mia celo miksi esperantan salutmesaĝon kun tristaj militaj novaĵoj, sed tio estas neevitebla kaj deviga afero, ĉar tiel estas la realo, kaj espereble dum la kongreso ni mencios tion kiel inta kaj abomeninda koŝmaro.

Estu bonvenaj en la ĝardenan urbeton, kaj ĝuu la kongreson en harmonia etoso, tiel kiel okazas en ĉiaj eventoj kaj renkontiĝoj tra la tuta mondo.

Vivu Esperanto!

*Ángel Arquillos López*  
*Prezidanto de HEF*

## **Mensaje de salutación de la Alcaldesa de Comillas**

Como alcaldesa de Comillas tengo el honor y privilegio de dar una grata bienvenida, por primera vez, a los participantes del 80º Congreso Español de Esperanto que se celebrará en nuestro municipio del 29 de abril al 3 de mayo.

Desde esta pequeña villa marinera, de la que tengo el honor de ser su alcaldesa, quiero destacar que esta cita cobra una especial relevancia ante los acontecimientos actuales, donde es más necesario que nunca la comunicación común por encima de las diferentes culturas.

Además, quiero agradecer profundamente a la Federación Española de Esperanto (HEF) y la Asociación Cantabra de Esperanto (KantEA) por haber elegido un marco único como Comillas para celebrar nuevamente este encuentro de manera presencial, tras el parón que supuso la pandemia del coronavirus.

Para finalizar, sin duda alguna, estaréis en uno de los pueblos más hermosos y conocidos de Cantabria, con un conjunto arquitectónico magnífico enmarcado por un entorno natural y paisajístico de excepción.

Os animo a recorrer y a disfrutar de toda la belleza que impone a los sentidos.

Bienvenidos a Comillas.

*María Teresa Noceda Llano*  
*Alcaldesa de Comillas*

## Salutmesaĝo de la Prezidanto de KantEA



Kiam en 2019 la Kantabra Esperanto-Asocio aprovis apogi la okazigon de la 79a HEF-kongreso, en Kantabrio, neniu el ni povis suspekti ke, komence de dumil dudek, nian mondon trafos tiel drasta ŝanĝiĝo.

Feliĉe nun, post dujara sufero kaŭzita de terura pandemio, ni povas finfine renkontiĝi denove por feste kunĝui la uzon de nia lingvo: Esperanto.

Mi deziras aparte danki la Urbestrinon de Comillas, María Teresa Noceda Llano, kaj ties Magistratanon pri Kulturo, Pedro José Velarde Castañeda, pro ilia malavara subteno.

Kompreneble, mi ankaŭ volas esprimi mian dankon al ĉiuj homoj, kiuj diversmaniere faris sian eblon por la sukceso de la Kongreso.

Nia plej granda deziro estas ke, dum la kvintaga daŭro de la kongreso, ĉiuj landaj kaj eksterlandaj kongresanoj povos plene travivi la kutiman etoson de la HEF-kongresoj, en la bela trankvila kaj gastama vilaĝo Comillas.

Ni preparis por vi aron da ĝuindaj diverstemaj prelegoj, ekskursojn kaj kelkajn artajn prezentojn, kun la celo ke vi plene amuziĝu kaj trovu vin feliĉaj inter ni.

Bonvenon do al la 80a Hispana Kongreso de Esperanto.

Sanon kaj Esperantokulturon  
Rafael Moncalián García (Prezidanto de KantEA)

# La kongresurbo



Comillas estas urbeto de Kantabrio, subŝtato de Hispanio. Ĝi situas en la komarko de la Okcidenta Marbordo

Comillas elstaras ne nur pro siaj mezepokaj kaj barokaj konstruaĵoj, sed ankaŭ ĉar ĝi estas unu el la malmultaj lokoj ekster Katalunio, en kiuj troveblas tra la tuta urbo monumentaj verkoj de modernistaj artistoj kiel Antoni Gaudí aŭ Domènech i Montaner. Iliaj verkoj abundas kaj videblas en la tuta urbo, ekzemple Kaprico de Gaudí aŭ la Palacio de Sobrellano.

La iamaj konstruaĵoj de la Pontifika Universitato estas unu el plej elstaraj ekzemploj de la modernisma arkitekturo de la urbo. Nuntempe ĝi estas sidejo de unu el la kampusoj de la Universitato de Kantabrio.

Dum granda parto de la 19a kaj 20a jarcentoj, al ties tradicia markaraktero, aldoniĝis la fakto ke ĝi fariĝis somerur-



mejo de la hispana reĝa familio, kaj sekve ankaŭ de la hispana nobelaro kaj aristokrataro, speciale madrida, kataluna kaj eŭska. Nuntempe, ĝi estas tre ŝatata kaj vizitata somerumejo, same kiel aliaj marbordaj lokoj de Kantabrio.



## La kongresejo



La kongresejo de la 80a Hispana Kongreso de Esperanto estas la kulturdomo “El Espolón”, kiu situas en la strato Antonio López, 3.

Ĝi estas konstruaĵo de la 18a jarcento, kiu konsistas el prelegsalono, komputika ĉambro kaj aliaj ĉambroj taŭgaj por instruado, por atelieroj kaj

kiel kunvenejoj de pluraj kulturaj asocioj, biblioteko, centra korto kun scenejo por prezento de muzikaj festivaloj kaj teatraĵoj, kaj sidlokoj por pli ol ducent homoj. La korto, kiu havas vitran tegmenton, estas ĉirkaŭita de tri klaŭstroj etaĝe aranĝitaj, kiuj permesas la prezenton de plej diversaj eksponoj.



80a HEK



Kongreslibro

# El Soplao



El Soplao estas stalaktita kaverno, situanta en la montoĉeno Arnero, en municipoj Valdáliga kaj Rionansa, en Kantabrio.

El Soplao situas je 540 metroj super la marnivelo, kaj ĝi longas 20 km, el kiuj nur 4 km viziteblas. La kaverno troviĝas ene de la Cavina-monto, kie malkovris ĝin la zink- kaj plumboministoj, kiuj tie minis inter 1857 kaj 1978.

La kavernaj koridoroj situas sur 6 etaĝoj. Allogaj estaĵoformaj stalagmitoj el aragonito estis malkovritaj sur la 2a etaĝo, komence de la 20a jarcento.

El Soplao estis malfermita por la publiko en somero de 2005, kaj, de tiam, ĝi fariĝis grava turisma allogaĵo de Kantabrio.

La kaverno alireblas pere de trajneto cirkulanta sur malnova mineja fervojo. La vagonaro portas po 48 turistojn tra enira tunelo ĝis la Halo de Spi-

ritoj. Tie la vizitanto povos ĝui la vidon de la Gorda (Maldikulo) kaj aliaj estaĵoj el stalagmito kaj stalagmito.

En 2008 oni trovis apud El Soplao la plej grandan sukcenokampon en Eŭropo.



Foto de Emilio Gómez Fernández


# Santander

10



Santander estas havena urbo, situanta ĉe golfeto. Ĝi estas la ĉefurbo de la subŝtato Kantabrio, en la nordo de Hispanio. Ĝi havas 178.465 loĝantojn.

Vizitindas Centro Botín, Palaco de la Magdalena, Granda Kazino, Muzeo de la Kantabra maro, Muzeo de Prahistorio kaj Arkeologio, Muzeo de Moderna kaj Nuntempa Belartoj, Promejo Reina Victoria, pluraj plaĝoj, ktp.



80a HEK

Kongreslibro

# Santillana del Mar

## Altamira

11



Santillana del Mar estas samtempe municipo kaj vilaĝo situanta sur la norda Jakoba vojo al Santiago-de-Kompostelo. La vilaĝo estas mezepoka, kaj la plejmulto de la tiamaj konstruaĵoj konserviĝis preskaŭ sensanĝaj. Tial ĝi estis konsiderata kiel unu el la plej belaj vilaĝoj en Hispanio.

Apud la vilaĝo situas malgranda, tamen eksterordinara, bestoĝardeno gastiganta pli ol 2000 bestojn el 450 malsimilaj specioj.

En la municipo Santillana del Mar situas la mondfama groto Altamira, kun gravaj ŝtonepokaj surrokaj pentraĵoj. Apud la groto, ekzistas vizitebla museo, en kiu troviĝas ege bona kopio de la originalaj pentraĵoj de la groto.

En 1985, UNESKO deklaris la groton Altamira ‘heredajo de la homaro’, surbaze de tio ke “Altamira reprezentas unu el la plej famaj lokoj de la prahistoria arto”.



# Utilaj informoj

## Gravaj telefonnumeroj

12

Kongresejo . . . . .	942.72.02.76	Bushaltejo . . . . .	942.72.08.22
Urbodomo . . . . .	942.72.00.33	Taksiejo . . . . .	942.72.00.34
Turisma oficejo . . . .	942.72.25.91	Loka polico . . . . .	609.44.62.01
Apoteko . . . . .	942.72.22.40	Ĝendarmejo . . . . .	942.72.00.35
Dispensario . . . . .	942.72.22.70	Poŝtoficejo . . . . .	942.72.00.95

## Vegetaranoj kaj veganoj

En Comillas ne ekzistas restoracioj por vegetaranoj aŭ veganoj. Tamen, ĝenerale, oni povas manĝi vegetarane se, sufiĉe antaŭtempe, oni mendas pladojn preparitajn laŭ la gusto de la manĝanto. Ekzemple en la restoracio “La Cuestuca”, kiu situas kontraŭ la kongresejo, je apenaŭ dek metroj.

Aŭtobusoj - Cantábrica		
De Comillas al Santander		
Comillas	Santander	Tagoj
07:15	08:20	Lunde – Vendrede (se nefestaj tagoj)
10:00	11:10	Ĉiutage
15:30	16:40	Ĉiutage
17:15	18:30	Lunde – Vendrede (se nefestaj tagoj)
De Santander al Comillas		
Santander	Comillas	Tagoj
10:30	11:40	Lunde – Vendrede (se nefestaj tagoj)
11:30	12:40	Sabate, dimanĉe kaj festaj tagoj
12:55	14:05	Lunde – Vendrede (se nefestaj tagoj)
17:15	18:25	Lunde – Vendrede (se nefestaj tagoj)
19:00	20:10	Ĉiutage



La donac-kupono validas nur ĝis la stoka elĉerpiĝo de la proponitaj titoloj.

### Listo de libroj akireblaj per donac-kupono

Titolo	Prezo	KUPONO	Fina prezo
Omage al Lorca + Cigana romancaro	21	11	10
Per biciklo tra la mondo (Hispanlingva)	13	8	5
El miaj sonoraj soloj	10	6	4
Esperantistoj en Teruel	15	5	10
Ibere libere	13	5	8
Makako kaj Antono	12	4	8
Ombro sur verda pejzaĝo	8	3	5
Platero kaj mi	8	2	6
Tirano Banderas	9	3	6
Ĉiuj steloj etas nokte	12	2	10
Sferoj-10	12	4	8
Sferoj-9	9	3	6
Sferoj-8	9	3	6
Sferoj-7	9	3	6
Sferoj-6	9	3	6
Sferoj-5	9	3	6



## Floreal Martorell

Floreal Martorell, aŭ Flo, fondis muzikekzercejojn en Donneville (proksime de Tuluzo) en 1980. Inter 1981 kaj 1987 li fondis kaj mastrumis la Collectif d'Activités Musicales (CAM), kolektivo de muzika agado.

En 1987 Flo esperantistiĝis, kaj starigis Esperanto-rokasocion, kaj en januaro 1988 fondis Eurokka-n. Poste, en 1990 li kreis la diskeldonejon Vinilkosmo.

Flo partoprenis en la organizado de multaj festivaloj kaj spektakloj de SAT kaj UEA. Li partoprenis en du KEF-oj en Skandinavio kaj respondecis pri la festivalprojekto KAFE. En junio 1999, li estis elektita Prezidanto de la federacio Esperanto Midi-Pyrénées.

De 2006 ĝis 2014, Floreal Martorell mastrumis kun la Eurokka-teamo la artan programon kaj teknikan organizadon de FESTO, festivalo organizita de JEFO.

80a HEK



Lia diskoeldonejo, Vinilkosmo, proponas ĉiujare al la esperanta kultura mondo novajn kantistojn kaj muzikensemblojn.

En 2012, Floreal Martorell estis distingita per la FAME-premio de la germana urbo Aalen.

## **Aranĝo de spektakloj**

Trejnadsesio pri organizado de spektaklo kadre de internaciaj kulturaj aranĝoj.

La trejnado konsistas el du partoj kies celo estas, por la unua parto, ebligi al la partoprenantoj akiri bazajn konojn kaj metodojn pri organizado de spektaklo, kaj, por la dua parto, ebligi la malkovron de la bazaj necesaj teknikajoj por plenumo de koncerto en plej bonaj teknikaj kondiĉoj.



La kongresejo disponas vifion, kiun la kongresanoj povas uzi senpage.

Petu la pasvorton en la akceptejo.

Kongreslibro

---

## Niko Voloshyn

---

Niko Voloshyn el Ukrainio, esperantisto ek de la 1985a jaro. Multjara estrarano de UkrEA, redaktoro kaj eldonisto de E-periodaĵoj “Helianto” kaj “Ukraina stelo”, prezidanto de Lucka EK.

Li aktive kunlaboras kun E-grupo de Valencia, “Beletra almanako”, E-urukka.

Profesie li estas artisto, karikaturisto kaj eldonisto. Li partoprenas multajn internaciajn konkursojn kaj ekspoziciojn de karikaturo.

### Karikaturo kiel efika ilo

#### en periodaĵoj, aparte en Esperantujo

Temas pri: pli ol centjara tradicio uzi la karikaturojn en E-periodaĵoj ne nur kiel ilustraĵoj sed ankaŭ kiel varbilo por... kaj reklamo de Internacia lingvo. Aktualigo de karikaturo en nuna E-vivo. Mia sperto kiel karikaturo.



**Fundación  
Esperanto**

C/ Cadena 20-22 1º izq.

50001 Zaragoza

fundacion@esperanto.es

Donacoj: ES15 2100 5553 3621 0040 6825

---



15

### Literatura Besedo

Liven Dek invitas la literaturemajn kongresanojn al literatura besedo.

Tiu neformala aranĝo okazos ekster la kongresa programo, kaj ekster la kongresejo, je la 22a horo de la 30a de aprilo, sabato.

La lokon oni anoncos sur la informa afiŝtabulo de la kongresejo.

### Fundación Esperanto

Fundación Esperanto estas fondaĵo, kun fizika sidejo en Zaragoza. Ĝin direktas Patronaro, kaj ĝia celo estas stimuli la instruon kaj disvastigon de la internacia lingvo Esperanto.

Ajna esperantisto povas kontribui per donaco. Tiuj donacoj, en Hispanio, donas al donacanto fiskajn avantaĝojn.

---



# Programo

(A) akceptejo; (K) Salono Antonio Madrazo [kinejo];  
(SZ) Salono Zamenhof; (FdD) Salono Fernando de Diego

Vendredo, 29a de aprilo				
Tempo	Programero		Okazejo	
10:00-13:30	Akcepto de kongresanoj (AdK)		(A)	
13:30-16.00	Tagmanĝa kaj ripoza tempo			
15:30 ...	Ekskurso al "El Soplao"			
16:00-18:50	Akcepto de kongresanoj	Filmoj	(A)	(K)
19:00-20:00	Inaŭguro de la Ekspozitaĵo: Esperanto Lengua y Cultura — Interkona vespero.		Korto	
20:00...	Frata Komuna Vespermanĝo (el manĝaĵoj alportitaj de la kongresanoj)		Salono FdD	


Sabato, 30a de aprilo			
Tempo	Programero		
09:00-09:50	(FdD) Rafael Blanco: Grabiél Aresti en Esperanto	AdK	Libroservo
10:00-10:50	(SZ) Lorenzo Noguero Antau 500 jaroj. Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo		
11:00-11:30	Filmoj en Esperanto (K)		
11:30-12:20	(SZ) Vicente Manzano: Pri la unukornulo, la reguleco de Esperanto kaj aliaj nereaj estaĵoj		
12:30-13:20	(SZ) José Antonio del Barrio: El Kantabrio ĝis Kanado: veturiloj de 'feroca' esperantisto		
13:30-16:00	Tagmanĝa kaj ripoza tempo		
16:00-16:50	(SZ) Miguel G. Adúriz: Belartaj Konkursoj de UEA	Filmoj (K)	
17:00-17:50	(SZ) Javier Alcalde: Esperanto kaj anarkiismo – kiam, kie, kiel, kial?		
18:00-19:30	(Korto) Koncerto de Jomo		
20:00-22:00	Tempo por Vespermanĝo		

Dimanĉo, 1a de majo				
Tempo	Programero			
09:00-09:50	(SZ) Prezento de novaj eldonaĵoj	Ĝenerala Kunsido de HEF (SZ)	AdK	LS
10:00-10:50	(FdD) Floreal Martorell: Elementajn konojn pri sontekniko por spektakloj			
11:00-11:30	(K) Filmoj en Esperanto			
11:30-12:20	(SZ) Kongresa Inaŭguro – Ana Manero: “Projekto Lorca” de Hispana Esperanto-Federacio			
12:30-13:20	(SZ) Frata renkonto kun kantabraj poetoj			
13:30-16:00	Tagmanĝa kaj ripoza tempo			
16:00-17:50	Kegloludado (plenaere, en la kegloludejo)	AdK	LS	
18:00-19:30	Kabaredo Verda Banano (Georgo Handzlik kaj Saŝa Pilipovic)			
20:00-22:00	Tempo por Vespermanĝo			

Lundo, 2a de majo				
Tempo	Programero			
09:00-09:50	(SZ) Floreal Martorell: Elementajn konojn pri organizado de spektaklo	AdK	Libroservo	
10:00-10:50	(SZ) Ana Manero: Historio de la libro			
11:00-11:30	(K) Filmoj en Esperanto			
11:30-12:20	(SZ) Vicente Manzano: Fari demandaron ne tiom facilas, kiel oni pensas. Kiel dezegni bonan demandaron?			
12:30-13:20	(Korto) Koncerto de Georgo Handzlik			
13:30-16:00	Tagmanĝa kaj ripoza tempo			
16:00-17:30	(SZ) Ewa Grochowska: Aŭrovido – ĉu taŭga loko por Esperanto?	AdK	Libroservo	
17:45-18:45	(SZ) Niko Voloshyn: Karikaturo kiel efika ilo en periodaĵoj, aparte en Esperantujo			
19:00-20:00	(Korto) Koncerto de Saŝa Pilipovic			
20:00-22:00	Tempo por Vespermanĝo			

Mardo, 3a de majo	
09:00-20:00	Tuttaga ekskurso al Santader, Santillana del Mar, Altamira.

## Prelegoj kaj prelegantoj



### Lorenzo Noguero

Li naskiĝis en 1963 en Huesca. En Zaragoza Universitato, li studis Juron. Li ekesperantiĝis en 1984 en la asocio “Frateco”, trairante de scivolemo al entuziasmo. Membro de “Frateco”, HEF, UEA kaj SAT, li estas Prezidanto de “Frateco” (ekde 2003) kaj Prezidanto de “Fundación Esperanto” (ekde 2019). Li kutime gvidas E-kursojn. Foje li prelegis: “Ĉokolado: la amiko el Ameriko” (Brazila Kongreso, 2004), “Historio de Esperanto en Aragono” (Hispana Kongreso, 2017), “AMB... Antonio: Movado kaj Beletro”, memore al Antonio Marco (His-

pana Kongreso, 2021, unua virtuale okazinta). Elstare, lia vivo estas kuniĝita kun Eunice Alberto, brazila esperantistino.

### ANTAŬ 500 JAROJ.

#### Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo.

Inter 1519-1522 okazis nekredebla aventuro en la Historio: la ekspedicio de Magelano-Elkano [Magalhães-Icarno] ĉirkaŭnavigis unufoje la terglobon. La komenca projekto estis veturi tra Okcidento al Oriento, cele al la insuloj de la specioj kiuj troviĝis en sudorienta Azio.

La preleganto proponas mensan enŝipiĝon al tiu monda rondiro vere mirinda kaj memorinda. Pri tiu monda aventuro aperis en nia monda idioma Esperanto leginda libro (libere atingebla en [interreto.gutenberg.org](http://interreto.gutenberg.org)) de ĉeĥa esperantisto František Omelka: “La granda admiralo. Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo”.



---

## Vicente Manzano-Arrondo

---

Viko (Vicente Manzano-Arrondo) estas aktivulo en kaj ekster Esperantujo, rilate ĉefe al kelkaj sociaj meĥanismoj de subpremado. Li estas profesoro en la Universitato de Seviljo pri esplorado de la homa konduto, doktoro pri psikologio, ekonomio kaj edukado, kaj diplomita en la studoj pri Interlingvistiko en la Universitato Adam Mickiewicz de Poznano (Pollando). Li esperantiĝis en 2016 precize pro la deziro serĉi solvojn rilate al la lingva subpremado en la universitatoj.

### **Pri la unukornulo, la reguleco de Esperanto kaj aliaj nerealaj estaĵoj**

En la klopodo konvinki neesperantistojn pri la taŭgeco de Esperanto kiel komunikilo, unu el la ĉefaj argumentoj estas, ke tiu lingvo ege facile lerneblas, ĉefe ĉar ĝi regulas, ne havas esceptojn. Ĉi tiu prelego celas iel montri malkonsenton pri tiu aserto. Certe Esperanto estas pli regula ol malregula, aŭ ĝi estas malpli malregula ol la plejmulto el la lingvoj, sed oni ne tro fieru pri tia karaktero. La plendo pri la nereguleco ne celas esti nur plendo, sed ĉefe peto: bonvole ni ne tro eniru en la kutimon plimalreguligi la lingvon; estus bonege se oni klopodus fortigi la uzadon de vortoj, kiuj plifaciligas la lernadon kaj proksimigos la rezulton al la origina ideo. La prelego montros ĉi tiun aferon per konkretaj ekzemploj.



19

### **Fari demandaron ne estas tiom facile, kiel oni pensas. Kiel dezegni bonan demandaron?**

Entreprenejoj scivolemas pri aĉetontoj. Politikaj partioj, pri voĉdonontoj. Amaskomunikiloj, pri spektontoj. Organizadoj, pri membriĝontoj. Kaj sana homo, pri la aliaj. Plurfoje la scivolemo serĉas kontenton per demandoj. Sed mi rimarkas, ke la maniero realigi ilin tro da fojoj atingas malbonan rezulton. Demandi per demandaro ne estas tiom facila tasko, kiel oni emas pensi. Per ĉi tiu kontribuo mi celas reliefigi la tiklajn momentojn en la procezo plani kaj realigi demandaron. La plejmulto okazas antaŭ la redaktado de la demandoj kaj rilatas kaj al la psika flanko el respondontoj kaj al la vera konscio pri la celo de la esplorado je la flanko de la esploristo. Por klarigi pri tio, mi ne nur informos pri teorio sed klopodos montri realajn ekzemplojn.



## Ana Manero

Ana Manero naskiĝis en Madrido en 1963. Bibliotekisto. Ŝi laboras en la Nacia Biblioteko de Hispanio. Esperantisto de 1989. Prizorganto de la Biblioteko Juan Regulo Pérez de Hispana

Esperanto-Federacio. Kadre de ŝia biblioteka agado, ŝi kunordigas la projekton Bitoteko kune kun Miguel Ángel Sancho. Krome, ŝi redaktas du lingve la bibliotekan retejon kaj mas-trumas la bibliotekan retkatalogon. En 2015 al ŝi estis aljuĝita Diplomo pri Elstara Agado fare de la estraro de UEA. En 2017, la Premio Ada Fighiera-Sikorska, kadre de la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo.

### Historio de la libro

De la argiltabelo al la bito. Fulma vojaĝo tra la historio de la libro, tiu miriga artefakto, neniam sufiĉe laŭdata, kiu permesas la disvastigon de pensoj kaj mesaĝoj superante la barilojn de la spaco kaj la tempo kaj tiel etendante la homajn memoron kaj imagon.

### Projekto Lorca de Hispana Esperanto-Federacio

Prezento de la rezultaj eldonaĵoj de la projekto: Cigana romancaro, de Federico García Lorca (biteldono) kaj Omaĝe al Lorca, editorita de Miguel Fernández.

La kuna prezento de ambaŭ eldonaĵoj sendube ebligas al la partoprenantoj interesan promenon tra la lastaj kvindek jaroj de la Esperanto-kulturo en Hispanio.




---

## Liven Dek

---

Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek, ktp) (1950 - ) nuntempa Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA. Kiel verkisto, li aŭtoras diversajn novelojn kaj poemojn, pluraj tradukitaj kaj eldonitaj en diversaj lingvoj. Li tradukis diversajn verkojn en Esperanton. Kiel preleganto kaj gvidanto de literaturaj kursoj, li partoprenis en diversaj seminarioj kaj kongresoj. Grafike li kontribuis al la E-kulturo per dezajno de librokovriloj, ekzemple por la serio “Originala Literaturo” de IEM. Kiel eldonisto, li kreis plurajn libroseriojn (Sferoj, Hispana Literaturo, ktp), kaj publikigis verkojn de aliaj aŭtoroj. Li establis kaj administras kelkajn esperantajn jutubajn kanalojn. Li estas eksmembro de la Akademio de Esperanto, laŭ propra decido, kaj verkis dudirek-



21

tan vortaron kaj lernolibron por hispanlingvanoj.

### Belartaj Konkursoj de UEA

Flugrigardo al la nuna etapo de la eksterordinara aventuro de tiu bonega ideo ekirinta en 1950, kaj la provo ekkompreni la duoblan demandon: Kie kaj kien?



### Prezento de du libroj juz aperintaj

Roberto Garvía, profesoro pri sociologio en la Universitato Carlos III el Madrido, prezentos sian verkon “Lengua y utopía, el movimiento esperantista en España (1890-1936)”, (Lingvo kaj utopio, la esperanta movado en

Hispanio). La libro estas eldonita de la Universitato de Granada.

Alberto Granados, vicprezidanto de HEF, prezentos la libron “Esperanto y esperantistas de Teruel – Esperanto kaj esperantistoj en Teruel”, verkita de la historiisto Serafín Aldecoa. La libro traktas la historion de la lingvo Internacia en Teruelo komence de la 20a jarcento.



## Ewa Grochowska

Ewa Grochowska estas Polino kaj Francino. Ŝi naskiĝis en la okcidenta parto de Pollando, sed 30 jarojn ŝi loĝis en Bjalistoko. Esperanto estas ŝia familia heredaĵo. Ŝiaj gepatroj agadis en la loka Esperanto societo. La patrino, Maria Grochowska instruis la Internacian Lingvon. Pro sia sindediĉa agado ŝi ricevis la Insignon de Merita Esperantisto. En sia junaĝo Ewa havis diversajn ŝatokupojn kaj Esperanto ne estis la plej grava. Krome, ŝi revis pri verkado de libroj. Bedaŭrinde, laŭ la volo de sia patro, ŝi studis ekonomion kaj poste ŝi laboris en granda, komerca entrepreno. Pasis multe da jaroj antaŭ ol Esperanto revenis en ŝian vivon; tiam ŝi jam vivis en Francio. De dek jaroj Ewa estas aktiva membro de la Asocio Esperanto en Grenoblo. Depost sia emeritiĝo ŝi realigas sian revon

pri la verkado. Dum kelkaj jaroj ŝi estis membro de la ateliero pri verkado ŝe Interaĝa Universitato en Grenoblo. Tie ŝi studis verkteknikojn, kiuj stimulas la imagon. Verkante en Esperanto ŝi plibonigas sian lingvo-nivelon, do ŝi volonte partoprenas en literaturaj konkursoj, ĉefe en Belartaj Konkursoj, en kiuj ŝi ricevis multajn premiojn.

En la jaro 2021 estis eldonita la unua libro, kiun ŝi tradukis el la pola lingvo: «Ruĝaj vojoj de Aŭrovido».

### **Aŭrovido – ĉu taŭga loko por Esperanto?**

Temas pri la vilaĝo fondita en la jaro 1968 en Barato (en Tamulio), kies funkciado baziĝas sur la spirita, tamen senreligia, instruado de Sri Aŭrobindo (hinda filozofo, jogano, verkisto) kaj de Mirra Alfassa - Patrino (klera, altspirita francino). En la jaro 1988 la Barata Parlamento atribuis al tiu urbeto laŭleĝan statuton, unikan en la mondo, ĉar, kiel deklarite en la Ĉarto, Aŭrovido estas propraĵo de la tuta homaro. Aŭrovido estas ankaŭ mondfama eko-vilaĝo, loko de sciencaj esploroj, alternativaj terapioj, alternativa edukado kaj loko de realiĝantaj revoj. En tiu loko vivas paco ĉirkaŭ 3300 personoj, kiuj devenas el 60 landoj. UNESKO subtenis Aŭrovidon per kvar rezolucioj.





## Rafael Blanco Arbe

Rafael Blanco Arbe ( Pamplono-Irunjo.1963).

Li loĝis en Vitorio-Gasteiso, kie li fondis, kune kun aliaj junaj esperantistoj, la asocion Alava E-Asocio en 1987, poste li loĝis en Altsasu, de kie li redaktoris revuon Kuspe.

De kelkaj jaroj li loĝas en la navara vilaĝo Kaseda.

Li instruas eŭskan lingvon en mezlernejo de Sangüesa-Zangoza.

Gabriel Aresti, bilbaoa verkisto, estas, kune kun Xabier Lizardi kaj Jozean Artze, plej kvalita eŭskalingva poeto de la 20a jarcento.

Aresti mortis junaĝe en 1975, sed li postlasis plenmeritan literaturan verkaron.

Li estis unu el la unuaj verkistoj, kiu uzis la unuigitan formon de la lingvo, kaj, en la sesdekaj jaroj, li reenportis eŭskan poezion en la modernecon. Provokema, profeta, kelkfoje skandala, Aresti ĉiam celis la renaskiĝon de la eŭska lingvo per beletro, kaj la defendon de la laboristaro.

Kongreslibro



## José Antonio del Barrio

Naskiĝis en 1961 en Norda Kastilio (aŭ suda Kantabrio). Eklernis Esperanton en 1979 en Valladolido. Profesie fizikisto. Inter 2011 kaj 2020 prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. Nun direktoro de Fondaĵo Esperanto.

Titolo de la prelego: “El Kantabrio ĝis Kanado: veturiloj de ‘feroca’ esperantisto”.



## **Kegloludo**

Kegloludo estas tipa sporto de Kantabrio, kie eĉ plej malgranda vilaĝo havas sian kegloludejon.

La kongresanoj havos la ŝancon, unuafoje en sia vivo, aktive ekkoni ĝin.

80a HEK





**Javier Alcalde**

Javier Alcalde (Barcelono, 1978) estas politiksciencisto, kiu profesoras universitate. Membro de la Akademio de Esperanto, kie li direktoras la sekcion pri socia historio de Esperanto. Kune kun José María Salguero li kunordigis la kolektivan verkon "Antaŭ unu jarcento. Esperanto kaj la granda milito (SAT-EFK, 2018)". Li ĵus publikigis "Esperanto i anarkiismo: els orĝens (1887-1907)" (Edicions Malcriàs d'Agràcia, Quaderns Esperantistes I, 2022).

### Esperanto kaj anarkiismo: kiam, kie, kiel, kial?

Esplorinte diversajn fontojn, foje malmulte konatajn, mi pritraktos la debatojn, kiujn la ebleco de lingvo internacia vekis en la socialismaj rondoj antaŭ la Granda Milito, kun speciala atento al la akcepto kiun ĝi havis inter

la diversaj anarkiismaj tendencoj. La prelego ekos per analizo de utopiaj socialistoj (iusence praanarkiistoj kaj praesperantistoj) kaj daŭrigos kronologie ĝis 1907, dudek jarojn post la apero de la Unua Libro; multo okazis en tiu jaro, en pluraj mondopartoj.



### Esperanto, lengua y cultura

Ĉi migranta ekspozicio pri Esperanto spekteblas en Comillas okaze de la Hispana Esperanto-Kongresejo.

La ekspozicio konsistas el 15 pendigeblaj afiŝoj 100 x 70 cm grandaj. La diversajn aspektojn de la lingvo kaj la esperanto-movado estas bildigitaj per hispanlingvaj tekstoj kaj diversaj fotoj. Temas do pri enkonduko en nian kulturon, tiel ke vizitantoj povu poste pli vaste informiĝi.



---

## Georgo Handzlik kaj Saša Pilipovic

---

Saša Pilipovic estas serba profesia aktoro, kiu plurfoje ludis antaŭ la esperanta publiko okaze de kongresoj kaj aliaj aranĝoj. Li ankaŭ emas prezenti sursceneje belajn ciganajn kantojn.

Georgo Handzlik estas pola aktoro kaj esperanta kantisto, krom esperanta eldonisto.

Jam de longe, Saša kaj Georgo prezentas kabaredan spektaklon nomatan “Verda banano”.

---

## JoMo

JoMo (Jean-Marc Leclercq) estas franca kantisto kaj esperantisto.

Li havas tradician kaj rokan repertuaron en 22 lingvoj, interalie, kompreneble, ankaŭ en Esperanto, kaj ĝuste tial li estis menciita en la Guinness-libro pri rekordoj en la jaro 2000.

En 2007, li faris novan rekordon, kantante 25 kantojn en 25 lingvoj en la brita ĝardenurbo Letschworth.

Jam de jaroj, li, kune kun sia gitaro, kapablas plene altiri la atenton de la publiko dum siaj multaj koncertoj en la tuta esperanta mondo.



## Listo de kongresurboj

26

1	1920	Barcelona	24	1963	Barcelona
2	1921	Zaragoza	25	1964	Valencia
3	1923	Valencia	26	1965	Palencia
4	1924	Bilbao	27	1966	Bilbao
5	1925	Córdoba	28	1967	Zaragoza
6	1926	Madrid	29	1969	La Laguna
7	1928	Sevilla	30	1970	Mieres
8	1929	Oviedo	31	1971	Alicante
9	1932	Madrid	32	1972	Vigo
10	1933	Santander	33	1973	Madrid
11	1936	Barcelona	34	1974	Valladolid
12	1951	Tarrasa	35	1975	Lleida
13	1952	Valencia	36	1976	El Ferrol
14	1953	Bilbao	37	1977	Sabadell
15	1954	Zaragoza	38	1978	León
16	1955	Gijón	39	1979	Gijón
17	1956	Barcelona	40	1980	Madrid
18	1957	Madrid	41	1981	Murcia
19	1958	Castellón	42	1982	Málaga
20	1959	Málaga	43	1983	Zaragoza
21	1960	Pontevedra	44	1984	Sevilla
22	1961	Palma de Mallorca	45	1985	Cartagena
23	1962	Valladolid	46	1986	Vigo

47 1987	Madrid	73 2014	Ronda
48 1988	Valencia	74 2015	Cullera
49 1989	Bilbao	75 2016	Herrera del Duque
50 1990	Sant Cugat del Vallès	76 2017	Teruel
51 1991	La Laguna	77 2018	Madrid
52 1992	Mérida	78 2019	Málaga
53 1994	Málaga	79 2021	(Virtual)
54 1995	Salou	80 2022	Comillas



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA-ESPERANTO-FEDERACIO

**Hispana Esperanto-Federacio**

Rodríguez San Pedro 13-3-7  
ES-28015 Madrid  
Tel. +34 914 468 079  
info@esperanto.es

**Estraro**

Prezidanto: Ángel Arquillos López  
Vicprezidanto: Alberto Granados  
Sekretario: Manuel Parra  
Vicsekretario: Isidoro Ortega  
Kasisto: Jesús Miguel García Iturrioz  
Vocdonantoj: Ana Manero, Vicente Manzano, William Guerrero (HEJS)

## Listo de aliĝintoj

28

001 Liven Dek . . . . .	Muriedas . . . . .	Hispanio
002 Carlos Cordero Huecas . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
003 Águeda Biurrun . . . . .	Madrid . . . . .	Hispanio
004 Pedro Ullate López . . . . .	Cantabria . . . . .	Hispanio
005 Miguel Fernández Martín . . . . .	Madrid . . . . .	Hispanio
006 Floreal Martorell . . . . .	Tuluzo . . . . .	Francio
007 Javier Romero Tello . . . . .	Herrera del Duque . . . . .	Hispanio
008 Alberto Granados Orcero . . . . .	Teruel . . . . .	Hispanio
009 Itziar Arteche Urrutia . . . . .	Bilbao . . . . .	Hispanio
010 Guadalupe Barcina Amézaga . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
011 José Antonio del Barrio . . . . .	Alkorkono . . . . .	Hispanio
012 Ana Manero . . . . .	Madrid . . . . .	Hispanio
013 Jesús Miguel García Iturrioz . . . . .	Portugalete . . . . .	Hispanio
014 Ángel García Gutiérrez . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
015 Irina Grigorieva . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
016 Manolo Parra . . . . .	Madrid . . . . .	Hispanio
017 Carmen Blanco Peña . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
018 Ángel Arquillos López . . . . .	Málaga . . . . .	Hispanio
019 María Dolores Torres Mateos . . . . .	Málaga . . . . .	Hispanio
020 Mario Corada . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
021 Àlex Humet Cienfuegos-Jovellanos . . . . .	Antwerpen . . . . .	Belgio
022 Ite Tytgat . . . . .	Antwerpen . . . . .	Belgio
023 Sol Roca . . . . .	Tarragona . . . . .	Hispanio
024 Francesc Inglada . . . . .	Tarragona . . . . .	Hispanio
025 Antonio Justicia . . . . .	Huelma . . . . .	Hispanio
026 Concepcion Sanjuan . . . . .	Granada . . . . .	Hispanio
027 Alexandrina Timóteo . . . . .	Porto . . . . .	Portugalio
028 Rui Vaz Pinto . . . . .	Porto . . . . .	Portugalio
029 Eunice Alberto . . . . .	Zaragoza . . . . .	Hispanio
030 Lorenzo Noguero . . . . .	Zaragoza . . . . .	Hispanio
031 José Añó Belda . . . . .	Valencia . . . . .	Hispanio
032 Pablo Gonzalez Gonzales . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
033 Felicidad Vilches Ramirez . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
034 María Victoria Campo García . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
035 Julia Cantero Blanco . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio

036	Luis Díez Encinas	Leganés	Hispanio
037	Angelita Sanz Mayor	Madrid	Hispanio
038	Paulo Branco	Lisboa	Portugalio
039	Diemante Aniciene	Lisboa	Portugalio
040	Anne-Marie Ferrier	Fragnes La Loyère	Francio
041	Antoni Badia i Planes	Lleida	Hispanio
042	Faustino Castaño Vallina	Gijón	Hispanio
043	María Ángeles García González	Gijón	Hispanio
044	Frédéric Neyret	Lyon	Francio
045	Antonio Valén	Vigo	Hispanio
046	Miguel Boeiro	Alcochete	Portugalio
047	M <sup>a</sup> Manuela Boeiro	Alcochete	Portugalio
048	Rafael Moncalián Garcia	Santander	Hispanio
049	Carlo Minnaja	Padova	Italio
050	Laura Gilda	Paccagnella - Padova	Italio
051	Rosa del Mar Santiago	Obregón	Hispanio
052	Alberto Corral	Santander	Hispanio
053	Amparo García Royo	Zaragoza	Hispanio
054	Enrique Navarro Rubio	Zaragoza	Hispanio
055	Lupe Sanz Bueno	Madrid	Hispanio
056	Carmen Suarez Fernandez-Cid	Madrid	Hispanio
057	Jaime Vinielles de Pereda	Madrid	Hispanio
058	Francisco López	Bilbao	Hispanio
059	Víctor Martínez Hernández	Zaragoza	Hispanio
060	Deborah McCarney	Llandysul	Britio
061	Pere Navarro Rosinés	Barcelona	Hispanio
062	María José Vilchez Sánchez	Argoños	Hispanio
063	Olga Markova	Göttingen	Germanio
064	Rafa Blanco	Kaseda	Hispanio
065	Gisele Combes	Riom	Francio
066	Robert Combes	Riom	Francio
067	Antonio Cobos Hidalgo	San Vicente del monte	Hispanio
068	Vincent Gerbe	Fontaines sur Saône	Francio
069	Igone Manciles Marin	Bilbao	Hispanio
070	Lija Mazij	Alikanto	Hispanio
071	Justo González Soriano	Guardamar del Segura	Hispanio
072	Christian de Wilde	Bergerac	Francio
073	Jeannine de Wilde	Bergerac	Francio
074	Xabier Rico Iturriotz	Vitoria-Gasteiz	Hispanio

075	Santiago López Ferreira . . . . .	Zaragoza . . . . .	Hispanio
076	Gunnar Olsson . . . . .	Skövde . . . . .	Svedio
077	Félix Sánchez Boquete . . . . .	Santiago de Compostela . . . . .	Hispanio
078	Carmen Bedia . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
079	Cecilia Díaz Bedia . . . . .	Santander . . . . .	Hispanio
080	Jean-Marc (JoMo) Leclercq . . . . .	Toulouse . . . . .	Francio
081	Ricardo Biurrun . . . . .	Madrid . . . . .	Hispanio
082	Pedro Hernández . . . . .	Madrid . . . . .	Hispanio
083	Francisco Javier Martín Gómez . . . . .	Teruelo . . . . .	Hispanio
084	Francisco Julián Herrer Armijo . . . . .	Teruelo . . . . .	Hispanio
085	Juan Eduardo Dolz Najes . . . . .	Teruel' . . . . .	Hispanio
086	María Elvira Álvarez Iglesias . . . . .	Vigo . . . . .	Hispanio
087	Concepcion Pereira Lamelas . . . . .	Vigo . . . . .	Hispanio
088	Concepción Gilino Villarramos . . . . .	Vigo . . . . .	Hispanio
089	Namhaeng Lee . . . . .	Seoulo . . . . .	Sud-Koreio
090	Sukhee Choi . . . . .	Suwon . . . . .	Sud-Koreio
091	Jeongsuk Park . . . . .	Goyang . . . . .	Sud-Koreio
092	Hyonsuk Li . . . . .	Seulo . . . . .	Sud-Koreio
093	Haesim Park . . . . .	Seulo . . . . .	Sud-Koreio
094	Hubert De Meyere . . . . .	Bouffioulx . . . . .	Belgio
095	Michèle De Meyere-Villers . . . . .	Bouffioulx . . . . .	Belgio
096	Jeanne Draime . . . . .	Gosselies . . . . .	Belgio
097	José Miguel Claudios Domínguez . . . . .	Argoños . . . . .	Hispanio
098	Umberto Canelada Campos . . . . .	São Carlos . . . . .	Brazilo
099	Maria Martha Negraes Canelada . . . . .	São Carlos . . . . .	Brazilo
100	Evelyne Rotellini . . . . .	Arrout . . . . .	Francio
101	Evelyne Moroy . . . . .	Arrout . . . . .	Francio
102	Jean-Pierre Marcq . . . . .	Arrout . . . . .	Francio
103	Ewa Grochowska . . . . .	Eybens . . . . .	Francio
104	Pedro A. Garrote Escribano . . . . .	Valladolid . . . . .	Hispanio
105	Lydia Buyst . . . . .	Gooik . . . . .	Belgio
106	Octavio Alfonso Gutiérrez Moja . . . . .	Galdakoa . . . . .	Hispanio
107	Okjeong Kim . . . . .	Seulo . . . . .	Sud-Koreio
108	Guadalupe Casilla Mimbreno . . . . .	Portugalete . . . . .	Hispanio
109	David Redondo Rodríguez . . . . .	Bilbao . . . . .	Hispanio
110	Miguelángel Bueno Àvila . . . . .	Puente Villarente . . . . .	Hispanio
111	José Salguero . . . . .	Don Benito . . . . .	Hispanio
112	Hodei Redondo Cortés . . . . .	Bilbao . . . . .	Hispanio
113	Kristin Tytgat . . . . .	Antwerpen . . . . .	Belgio

114	Suzanne Emorine	Châteaugay	Francio
115	Michel Emorine	Châteaugay	Francio
116	Andrea Hernández	Guadalajara	Hispanio
117	Juan del Castillo	Madrid	Hispanio
118	Luis Eduardo Berdor Remón	Zaragoza	Hispanio
119	Raúl Salinas Monteagudo	Valencio	Hispanio
120	María Avelinda Ruiz Cervel	Zaragoza	Hispanio
121	Marion Quenut	Tuluzo	Francio
122	Carmen Figueira Luis	Zaragoza	Hispanio
123	Basi Figueira Luis	Falset	Hispanio
124	Ireneusz (Irek) Bobrzak	Warszawa	Pollando
125	Malgorzata (Gosia) Mlynarska	Warszawa	Pollando
126	Agnieszka Mozer	Varsovio	Pollando
127	Paulo Meliz Irache	Monzón	Hispanio
128	Laura Tejedor Bonhome	Santander	Hispanio
129	María Luisa De Lamo Blázquez	Munera	Hispanio
130	Vicente Manzano-Arrondo	Sevilla	Hispanio
131	Yuro Jung	Sevilla	Hispanio
132	Raia Androvska	Kardifo	Britio
133	Albert Stalin Garrido	Madrid	Hispanio
134	Riccardo Lamperti	Milano	Italio
135	Leandro Notari	Roma	Italio
136	Maria Rosaria (Sara) Spanò	Bremen	Germanio
137	Xavi Alcalde	Barcelono	Hispanio
138	Luis Serrano Tausía	Santander	Hispanio
139	Petra Severiano Laguna	Teror	Hispanio
140	Carlos Spinola	Malaga	Hispanio
141	Mario Lo Castro	Militello in Val di Catania	Italio
142	Joseba Iñaki Apaolaza	Gastejso	Hispanio
143	María del Pilar Menéndez Pérez	Madrid	Hispanio
144	Françoise Eriksen	Ramonville ST Agne	Francio
145	Pako Balibrea	Villarrobledo	Hispanio
146	Edorta Moreno	Santurtzi	Hispanio
147	Susana Zabaco	Zalla	Hispanio
148	Alex Monaghan	Tuluzo	Francio
149	Niko Voloshyn	Lutsk	Ukrainio
150	Roberto Garvía	Madrid	Hispanio



## Norda vento

Min ravas murmuro de roĵo kaj monto,  
ke la maja pluvo verŝiĝu sur min.  
Kiel la lupo mi kuros en nokto,  
ke nutru min via senlima spirit’.

Min gvidas la lumo de lunradio  
kaj la hela ruĝo de matena hor’.  
Al vi, verda lando, mi ŝuldas la vivon.  
Vi belas kaj mi amas vin el la kor’.

Mi volas salti de branĉo de kverko,  
vin laŭte nomi, ekflugi al val’.  
Mi ĉerpas forton el la norda vento  
kaj el impeto venanta el la mar’.

Plenmano da neĝo, da sablo aŭ tero,  
al mi komprenigas ke tro etas mi.  
Ĝi vekas kuraĝon sed ankaŭ suferon,  
pro miaj deven’ kaj malcerta destin’.

Mi volas salti de branĉo de kverko,  
vin laŭte nomi, ekflugi al val’.  
Mi ĉerpas forton el la norda vento  
kaj el impeto venanta el la mar’.

*Aŭtoro: José Fernando Agüeros González  
Traduko de Liven Dek*

\* Norda vento (Viento del norte) estas neoficiala himno de Kantabrio



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
FEDERACIO INTERNACIO DE ESPERANTO



KantEA

